



SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

4/91

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13

JULIO-AUGUSTO

KOMENCO MALFACILA, DAÛRIGO KURAGIGAS

Hodiaù kuêas antaù vi la tria numero de "SES INFORMAS". La unuaj eldonoj evidente kontentigis la ricevantojn. Almenaù la reagoj estas pozitivaj. Plurloke oni ĝojas pri la novstila SES-informilo kaj eĉ kunlaborantoj montriĝis. Mi ĝojas pri la akcepto de pluraj kontribuajoj kaj, ĉar ili grandparte ne estas ligitaj al iu ajn dato, mi havas ĉiam ion en rezervo. Plue vi povas mem konstati, ke la rubriko "GRUPAJ INFORMOJ" jam kreskis kaj tio estas ankaù pozitiva. Mi konscias, ke bone servi al ĉiuj estas pli rapide dirita ol farita, sed mi klopodas formi la enhavon ne nur en unu direkton. Kial skribi nur pri Esperanto? Se la spaco permesas, tiam certe artikolo pri alia temo, ekzemple pri io kulturhistoria, aù eĉ sciinda anekdoto povas pozitive pliriĉigi ankaù simplan informilon. Certe ankaù ŝercoj estas akcepteblaj. En tiu senco ni certe iras vojon, kiu prezentos al ĉiu ion akcepteblan. Tio estas sendube inda celo. Se ni per tio povas vekti la intereson de niaj membroj kaj instigi al pli da amikeco kaj agrablaj renkontiĝoj, tiam mia kontribuo estos aparta ĝojo. Koran dankon al vi ĉiuj. -FL-

* * *

La ĝenerala enkonduko de Esperanto, kiel unua lernenda fremdlingvo, signifas almenaù same grandan revolucion kiel la eltrovo de la libro-presado aù de la telefono, ĉar la efikoj de preso kaj radiofonio estos plivastigataj trans la regionon de la gepatra lingvo rekte al la tuta mondo.

[El Ekumena Esperanto-Forumo tradukis FL]

* * *

PLIINTIMIĜO KUN LA PENSO DE EDMOND PRIVAT

Claude GACOND

En pluraj libroj Edmond Privat esprimis sian admiron por la kuraĝa sindonemo de la kvakeroj, kaj iom antaŭ la dua mondmilito li aliĝis al la Societo de la Amikoj. La 22-an de septembro 1940 li estis invitita prezenti sian koncepton pri la kvakera fido al amikoj de la Amikoj. Tiu prelego prononcita franclingve en la svis-germana vilaĝo Stalden aperis en 1940 sub la titolo **Liberté doctrinale et sincérité**. Tiu libreto ĉiam vekis tre grandan intereson, ĉar la argumentado de la amiko de Mahatmo Gandhi, favore al liberiĝo el ĉia kreda malsincero, disvolviĝas laŭ imitinda objektiveco.

En la kolokvo organizita en somero 1989 honore al la centjara jubileo de Edmond Privat, fare de KCE kaj CDELI en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, kie troviĝas la Muzeo Edmond Privat, mi prezentis la religian sintenon de la aŭtoro de **Vivo de Zamenhof**. Tion ĉi mi faris grandparte per citaĵoj el la menciita verko. Multaj ĉeestantoj esprimis la deziron povi akiri tiun libreton, kiu bedaŭrinde estas elĉerpita. La polo Tomasz Chmielik decidis tuj eklabori favore al ĝia esperantigo. Tiu laboro ekstartis kiel tasko okaze de traduk-kurso, kiun li gvidis samjare en La Chaux-de-Fonds kaj lia lernantino Juanita Turbillon entuziasme daŭrigis la laboron. Ŝian esperantigon stile reviziis Tomasz Chmielik kaj mi mem, por ke la eldonota libro bone integriĝu en la plenan verkaron de Edmond Privat. Ni tre verŝajne sukcesis en tiu triopa kunlaboro, kiu harmoniigis la tradukon al la esperanto-stilo tre aparta de Privat. Tiel naskiĝis la 15-paĝa bele bindita libro **Libero doktrina kaj sincero** de Edmond Privat, kiel unua numero en la eldona kolekto de la ĵus kreita Fondumo "Edmond & Yvonne Privat", kies celo estas iom post iom publikigi fotokopie la plenan verkaron de Edmond Privat. Ĝia adreso estas: Eldonejo "Libro-Mondo", T. Chmielik & P. Wimmer, Strato Jarzebinowa 3/30, PL-21-040 Świdnik (Pollando).

En Svislando tiu libro **Libero doktrina kaj sincero** kostas SF 16.50 + 2.- por la sendokostoj). Interesatoj povas ĝin mendi tra mia kanalo pagante la monsumon de SF 18.50 al mia poŝtĉekkonto 23-6818-6, Claude Gacond, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds kaj skribante tre legeble sur la pagilo ne nur siajn nomon kaj adreson, sed ankaŭ: **Mendo: Libero doktrina de Privat.**

Tiu eldon-aktiveco de Fondumo "Edmond kaj Yvonne Privat" certe instigos multajn esperantistojn al atenta trastudo de la kultura heredaĵo, kiu kaŝiĝas en la verkaro de Edmond Privat, verkaro ne bone konata, ĉar grandparte elĉerpita kaj publikita en tri lingvoj. La pioniro de esperanto esprimiĝis ne nur en la lingvo internacia, sed ankaŭ en la angla kaj en la franca, laŭ la cirkonstancoj. La sukceso de la projekto dependos de la eĥo, kiun ĝi renkontos flanke de la esperantistaro, kaj mi esperas, ke en Svislando mem ĝi havos interesatojn.

Baldaŭ aperos la multe pli dika kaj tre signifa verko **Interpopola Konduto. La kanceliero senkapigita** estas nun esperantigata de Thierry Flachon, kiu ankaŭ komencis sian traduklaboron kiel lernanto de Tomasz Chmielik okaze de alia tradukkurso en La Chaux-de-Fonds. Vere fruktodonaj estis tiuj seminarioj gvidataj de lerta kaj simpatia tradukisto.

* * *

EGE INTERESA MUZEO [de Heinrich Ringle Basel]

Antaŭ nelonge mi vizitis en Porrentruy la natursciencan muzeon de la nova kantono Ĵuraso. Inter aliaj temoj ĝi prezentas nian universon, la kosmon. Bildo montras la gigantan eksplodon, el kiu ĝi estiĝis. Mi sciis pri tiu eksplodo, sed mi ne sciis kiam ĝi okazis. Estis antaŭ 24 miliardoj da jaroj. Larĝa nigra strio, pentrita sur 3 sinsekvaj vandoj de la salono, montras la longecon de tia tempo. Pli efike estas komparo. Oni reduktas la 24 miliardojn al unu jaro. Tiam la 4500 jaroj ekde la konstruo de la piramidoj en Egiptio nur havas daŭron de 10 sekundoj. Kaj la homa vivo? Pri la daŭro de la universo estas dirita nenio. Sed sur la larĝa nigra strio ni trovas nian sunsistemon. Ĝi estiĝis antaŭ 5 miliardoj da jaroj kaj finos, pereos post 4 miliardoj. Sed ne - kiel mi pensis - pro iom post ioma malvarmiĝo, fridiĝo de la suno. Kontraŭe! Pro iom post iom pli fortaj kern-reakcioj la temperaturo de la suno ĉiam altiĝas. Finfine ĝi estos tiom alta, ke la suno kaj ĝiaj plej proksimaj planedoj, inkluzive la tero, vaporiĝos, diseriĝos. Kia perspektivo!! Ni nur povas esperi, ke dum la venontaj 4 miliardoj da jaroj venos al ni aŭ troviĝos por ni elsava solvo.

* * *

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO Spitalgasse 37.

1.7.19.30h kaj 29.7.19.30h

5.8.19.30h kaj 26.8.19.30h

ESPERANTOGRUPO "LA STELO" GENÈVE:

Atentu! Ne okazos kunvenoj en julio kaj aŭgusto;
Tamen okazos du renkontiĝoj sur insulo "Jean-
Jaques Rousseau". Kaze de malbona vetero en
"Café du commerce" [Molard].

Sabaton 27-an de julio kaj sabaton 31-an de
aŭgusto. Ambaŭdate 15.00-17.00h.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

15.8.15.00h ĉe Angelo Mellini en Hermetwil.

Video-film prezentado kaj pikniko.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof Untere Bahnhofstr.18.

3.7.20.00h Prelego pri Rumanio de Livio Nifescu
el Rumanio.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

8.7.14.00 Libera kunveno: Vizito de la keramika
kolekto en la Gilda Domo "ZUR MEISE"
Münsterhof 20.

12.8.19.00h komuna vespermanĝo en restoracio
"Sonnenberg".

ESPERANTO-SOCIETO BASEL: En julio ni paŭzas.

28.8.19.00h Monata kunveno: Ni minigolfos en
"Minigolf Allechwil". Ludoj kune
aŭ en grupoj.

25.9.20.00h Monata kunveno en restoracio "Mägd".
Parolos s-ro Gacond pri: "Pliintimi-
ĝo al la montaro Ĵuraso, kun lumbildoj".

* * *

LA PLEJ INTERNACIA EN ORIENTA EŬROPO

Internacia Junulara Semajno (IJS) de la 1-a ĝis
la 7-a de aŭgusto 1991 en Esztergom, Hungarujo.

Informoj: Lingvo-Studio H-1675 Budapest, PK87.

* * *

LINGVO-INSTRUISTO SERĈATA (Fondaĵo Talento)

Jam tutmondan famon akiris la eksperimenta bazlerneja klaso de la Fondaĵo Talento, kie 12 infanoj ellernis Esperanton tiel, ke ili jam lernas kelkajn aliajn studobjektojn per Esperanto. Post du jaroj de Esperanto-lernado, la 8-jaraj infanoj komencos lerni (ĉi-septembre) la duan fremdan lingvon. Estus tre grave por la eksperimento kaj ankaŭ por la disvastigo de Esperanto, se la duan lingvon instruus al ili denaska parolanto de la koncerna lingvo -- pere de Esperanto. Do ni serĉas instruist(in)on, kiu flue parolas Esperanton kaj povus instrui intense la anglan, francan, germanan aŭ hispanan lingvon al la infanoj dum almenaŭ du jaroj. Ni garantias por ŝi/li senpagan loĝadon kaj salajron por normala vivo kaj laboro en Hungario. Pedagogoj pretaj entrepreni tiun-ĉi unikan taskon bonvolu urĝe skribi al la Fondaĵo Talento, Budaporto, PF 102, H-2041 Hungario.
Telefono: (36-1) 153-7154 aŭ 173-3008.

Andras Lukacs

* * *


Al la bildo:
Malgraŭ la diversecon, la kantono Zŭrich formas unuecon. Tio estas la ideo, kiu esprimiĝu per la projekto "MULTITURICUM".

(Bildo: Roland Kurman)

6000 ge-Zŭrich-anoj hodie formis sian blazonon. Kio unuavide aspektas kiel Bazela karnevala lanterno elpupigas, ĉe pli bona rigardado, kiel supernature granda blazono de Zŭrich.

La proksimume 5 m alta, tridimensia formitaĵo konsistas el sennombraj, bluaj kaj blankaj, detaloj. Ronde 6000 ge-Zŭrich-anoj trikis, kroĉtrikis, gluis,

desegnis aŭ pentris 10x10 cm grandajn pecetojn. La organiza komitato "700 jarojn Svisa Federacio/Zŭrich morgaŭ" premiis tiun-ĉi, de Regula Suter-Droz el Zŭrich verkitan, projekton kaj decidis efektiviĝi ĝin. MULTITURICUM nomiĝas la blazono, kiun oni povis realigi dank' al eta kontribuo de la kantono kaj kun helpo de mecenatoj.
(Trad. el "Tagblatt de la urbo Zŭrich" F.L.



I. KIAL LERNI ESPERANTON ?

Nia lingvo jam estas cent jara, estas de multaj personoj ŝatata, estas parolata en ĉiuj landoj de la mondo. Kial ĝi ne estas ankaŭ je via servo por via nuntempa vivo ?

Mi eĉ dirus pli. Ni Svisoj ne konas niajn samtempulojn, ĉar ili parolas tri lingvojn aliajn ol ni parolas. Kaj baldaŭ ni estos tutsamaj Eŭropanoj, sed ni devos barakti per tridek kvin lingvoj. Certe oni povos imponigi al ni unu el ili, ĉu la rusan, la anglan, aŭ poste eĉ la ĉinan por honori la plej parolatan en la mondo! Esperanto, kontraŭe, ne prezentas sin kiel regema. Ĝi estas je nia servo por ke ni metu nin je la servo de tiuj, kiuj bezonas kontakti la najbarojn, kaj vivi kun ili pace kaj komprenitaj de ili.

Tiamaniere Esperanto ne fariĝas deviga; ĝi restas ilo je la dispono de tiuj, kiuj pretas alporti helpon, kiuj decidas vivi je la mezuro de nia jarcento nova, kaj fariĝi noviganta civitano. Esperantistoj kapablaj paroli, skribi, traduki, interpreti parole, trovos okazon por sin valorigi. Ili ankaŭ povos favori kunvenojn ĉe ni inter diverslingvaj lernejoj, vivi komune feriajn restadojn, kiuj samtempe permesos iom post iom kreskigi la interkantonajn rilatojn pere de niaj propraj lingvoj.

Kiam niaj streboj estos pruvintaj nian valoron, komercistoj, bankistoj, eĉ diplomatoj ne plu hezitos alpreni nian lingvon por multe simpligi siajn laborojn. Esperantigi oratorojn, fotokopii ĝin 35 fojojn, kaj tuta Eŭropo estas informita.

Ĉar tiuj-ĉi linioj estas adresitaj nur al Esperantistoj, ni devas esperi ke vi trovos okazon por transdoni al via ĉirkaŭaĵo nian ideon. Junuloj, aktivuloj, eĉ pensionuloj ĝuos alportisian entuziasmon.

-RWP-

* * *

De la 25-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto okazos la Universala Kongreso de Esperanto en Bergen/Norvegujo. En 1992 ĝi okazos en Vieno.

* * *

Dua Bulteno de la Kampado 91

9-a - 11-a de aŭgusto 1991 en Wiesental (Oetwil a.d.L.) apud Zürich.

Karaj geamikoj,

La kampado 91 nun okazos, tamen en malpli granda kadro ol ni unue planis, kaj du semajnojn poste. Estis pro la multaj festoj okaze de 700 jaroj de Svislando malfacile trovi lokon. Nun - ni sukcesis finfine. Dum tri tagoj ni invitas vin al kampado proksime de Zürich.

La partoprenado estas senkotiza. Vi simple kunportu viajn tendon kaj dormosakon, viajn muzikilojn, terpomojn, fruktojn (kaj la kanibaloj la kolbasojn) kaj nepre vian bonan humoron.

Por sentendaj homoj ekzistas, kontraŭ modesta pago, limigita kvanto da litoj en amasdormejo.

La organizantoj de la kampado estas la "Rain-bow-Infocordination", la Junularo Esperantista Svislanda kaj la Homaranisme Senpartia Movado. Se vi bezonas, tiam ni volonte al vi sendas personan invitleteron (kun germanlingva traduko) por la Svisa ambasadejo. Dum tri tagoj ni festos, dancos ktp. Kaj se la etoso estas bona, senprobleme eblas resti kelkajn tagojn pli longe. Kvindeko da Esperantistoj jam anoncis sian emon partopreni.

Krom muzikado ni havos laborgrupojn pri diversaj aktualaj temoj. Okaze ankaŭ prelegoj pri la situacio de la praamerikoj (indianoj) en USoNo, kaj precipe pri N.I.Sekvojo, esperantista praameriko, kiu sub falsaj akuzoj jam dum kvin jaroj sidas en USoNa malliberejo.

Pro nia planado ni proksimume devas scii, kiom da homoj partoprenos. Tial bonvolu skribi al ni, se vi partoprenos. Por trovi la lokon konsultu la mapojn sur la informilo, kiun vi ricevos ĉe D.M.Weidmann, Florastrasse 17, 8008 Zürich.

Do, ni atendas vian amasan partoprenon.

Por la organiza komitato de la kampado 91:

Dietrich M. Weidmann.

* * *

ESPERANTO EN AFRIKO

La unua afrika kongreso de Esperanto okazis de la 27-a de decembro 1990 ĝis la 2-a de januaro 1991 en Togolando, kun postkongresaj semajnoj en Benino kaj Ebura bordo.

Nun la dua afrika kongreso de Esperanto okazos de la 27-a de decembro 1991 ĝis la 2-a de januaro 1992 en Benino. La konstanta adreso estas: UEA, Afrika agado, p/a H.Bakker, Kastelenstr.231, NL-1082 EG Amsterdam.

La evoluo de, kaj la intereso pri Esperanto en Afriko bone komenciĝis. Legu, kion skribis Karl Heinz Renschler el Germanujo, i.a. pri la unua afrika Esperanto-kongreso:

"...Kiajn Esperantistojn mi renkontis en Afriko? La kongreson partoprenis 97 afrikanoj el 5 afrikaj landoj, 5 Eùropanoj el 4 landoj kaj 2 usonanoj. Neniu afrika Esperantisto havis pli ol 35 jarojn; ili konatiĝis kun Esperanto antaŭ proksimume 8 jaroj. Speciale surprizis min la lerteco, per kiu ili uzas nian lingvon. Komence kelkaj estis timemaj sed kun ĉiuj mi povis agrable konversacii, eĉ kun la plej juna, la 12-jara Aliko. La prelegoj kaj diskutoj estis viglaj kaj interesaj. Mi renkontis junan kaj freŝan entuziasmon. La estonteco de Esperanteco en Afriko komenciĝis kaj ni devas partopreni ĝin". -FL-

* * *

INFORMO EL PORTUGALUJO

Se vi interesiĝas aŭ intencas aĉeti domon en Portugalio por feriado aŭ pli longtempa restado, tiam turnu vin al s-ro Manuel José Pinguinha, Apartado 269, 2503C Rajnha Codex [Portugalio]. Li prizorgos ĉiujn internajn necesajojn.

* * *

Redaktfino

por "SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS" ESTAS
la 14-a de aŭgusto 1991.

* * *